

Scienca eĥo

Saniga blanka vino

Francaj vinspertuloj evoluigis blankan vinon, kiun fakte nur kuracisto devus preskribi – tiom salubra ĝi estas. La vinbersuko kun la nomo "Blanka Paradoxo" ("*Paradoxe blanc*"), farita laŭ tute nova vinber-elprempcedo, estas evoluigita de specialistoj ĉirkaŭ s-ro *Pierre-Louis Teissedre* de la universitato Montpeliero/Francujo, kaj laŭ ties recepto nun la unuan fojon estis enboteligita de speciale selektitaj vitkultivistoj.

La "salubra" blanka vino entenas ekz. kvarfoje pli da polifenoloj ol ruĝa vino. Polifenoloj estas tre gravaj kontraŭoksidiloj. Tio signifas, ke ili forkaptas en la korpo la t.n. "liberajn radikalojn" – temas pri oksigenkombinaĵoj resp. oksidoj kiuj atakas kaj detruas sangovazojn, favoradas aterosklerozon kaj korinfarkton, malfortigas la imunsistemon kaj eĉ kapablas provoki kanceron. Ĝis nun sole ruĝa vino entenas efikan kvanton da tiaj polifenoloj – sur kio baziĝas ties reputacio kiel "korpoprotekta eliksiro". Kutima blanka vino kontraŭe estas tute malriĉa je polifenoloj.

("Vermuta guto" resp. malavantaĝo por vinemuloj: la mirakla blankvino ankoraŭ ne estas trovebla sur la merkato, sed estas havebla nur ĉe certaj vitkulturistoj...)

Amo kaj bona amikrondo – tiom saniga!

Amo ne nur feliĉigas kaj donas flugilojn al la animo, ĝi ankaŭ sanigas la korpon – tion pruvis novaj studoj. Dum enketo de la universitato Telavivo/Israelo oni pridemandis edzojn pri la aktuala stato de iliaj edzeco, kaj samtempe mezuris la traflu-sangadon de la kormuskularo. Rezulto: Tiuj, kiuj sentis sin amataj de siaj edzinoj, mezurable pli malofte suferis pri mankhava trasangado de la koro kaj pri (pro tio kaŭzata) brustangoro. Tiu ĉi interrilato estis tute sendependa de aliaj influfaktoroj kiel ekz. streso aŭ fumado, kiuj ankaŭ favoradas sangmankon en la koro.

Ankaŭ bona amikrondo protektas kontraŭ malsanoj. Dum alia studo, kiu funde ekzamenis la rilaton inter psiĥo kaj imunsistemo, 420 volontuloj permesis esti infektataj kun malvarmumon kaŭzantaj virusoj. La enketo celis, ĉu personoj kun multaj socialaj kontaktoj disponas pri pli stabila imunsistemo. Rezulto: El la grupo de ekzamenitoj kun tri aŭ malpli da bonaj amikoj malsaniĝis 62% pro tuso kaj

nazkataro. De la partoprenantoj kun ses aŭ pli da amikoj nur 25% suferis pro malvarmumo. (Esperantistoj, plialtigu viajn amikarajn rondojn por resti sanaj!) (Fonto: "Bunte" *Medizin-Report*, n-ro 1/2003, p.92)

Verdaj spuroj en ruĝa medio

Kiel danĝeraj pasaĝeroj de sangosuĉantaj insektoj ili trovas siajn viktimojn kaj troviĝas ĉie en multaj tropikaj regionoj – la kaŭzantaj agantoj de la homa dormomalsano kaj la besta tripanosomo. La protozoajn flagelulojn el la genro "tripanosomo" oni speciale timas en Afriko, kie la parazitoj mortigas ĉiun jaron pli ol cent miloj da homoj.

Tiu, kiu jam estas vidinta sub la mikroskopo la delikate etajn parazitajn en infektitaj homoj aŭ bestoj, kiel ili plimultiĝas en la sango de la pacientoj kaj moviĝas per siaj longaj vipformaj vosto, nur malfacile povas imagi tion, kion nun eltrovis belgaj kaj brazilaj gen-esploristoj kaj raportis en la fakgazeto "*Proceedings*" de Usona Akademio de Sciencoj: nome, ke la afrikaj tripanosomoj – same kiel la en Sudameriko okazantaj unuĉelaj ĝermoj de la Ĉagasa malsano – posedas tutan serion de heredaj ecoj el la planta regno!

La "verda parenceco" de la protozoaj bestetoj estas – laŭopinie de la sciencistoj – klarigebla pere de la evoluhistorio de la flageluloj. Evidente la parazitaj, antaŭ milionoj da jaroj, "englutis" etajn algojn aŭ unuopajn ĥloroblastojn kaj tiel enkorpigis certajn plant-genojn en la propran heredsistemon – antaŭ ol ili kapablis elĵeti la fremdajn organelojn.

(Fonto: *FAZ, Natur und Wissenschaft*, 2003-02-05, p. N1)

Gen-teĥniko pereigas kotonparazitajn

La kultivado de genteĥnike ŝanĝita koton draste reduktis la parazitajn infestadon en la usona federacia ŝtato Arizono. Tion evidencigas studado de sciencistoj de Universitato de Arizono en Tuksono, publikigita kadre de interreta informo el la fakgazeto "*Proceedings*" de la usona Nacia Akademio de Sciencoj.

Yves Carrière kaj gekolegoj ekzamenis la rezultojn post kultivado de transgenaj, t.e. kun la toksin-geno de *Bacillus thuringiensis* provizitaj, kotonplantoj (Bt-koton). Sur entute dek-kvin inter 400 kaj 4300 km² grandajn kampojn estis konstatita la ĉeesto de la plej grava kotondamaĝa parazito, nome la ruĝa kontonkapsulvermo. Kvin jarojn